# Intensiva Kurso de Esperanto

## *Speciala por eventoj*

por prezenti parolan Esperanton

***Evento***: ..............................................................

***loko***: ..............................................................

***dato****:* ..............................................................

***Lernanto*** ..............................................................

***kursgvidanto***: ..............................................................

***daŭro de la kursero****: 10 lecionhoroj, en du renkontoj*

***Ilustraĵoj*** de Elison Simas

adaptaĵo por kurso intensiva el la libro
***Esperanto por Lernejaj klasoj****,* de Josias Barboza

**1**




**2026**

**Komunikaj lertecoj kaj lingveroj akirotaj en tiu ĉi unua parto de la kurso:**

1 Akiri bazajn informojn pri Esperanto kiel propono por la rolo de internacia lingvo;

2 komenci kaj nelonge vivteni baznivelan komunikadon en plej rutinaj socikuturaj situacioj:

. konatiĝi kun Esperanto, ties difino kaj celaro;
. komunikiĝi kun la instruisto en Esperanto en la leciona situacio;
. saluti kaj respondi al saluto neformale;
. sin prezenti kaj konatiĝi kun homoj en Esperanto;
. prezenti konatulon al alia homo;
. literumi kaj kontroli literumadon;
. lertiĝi pri bona prononco per ekzercoj kaj kantado;
. identigi homojn;
. konversacii pri la klasĉambro; identigi kaj nomi objektojn, montraj pronomoj;
. konversacii pri ecoj de aĵoj kaj homoj, adjektivoj;
. danki kaj respondi al dankesprimo;
. lertiĝi pri la uzo de la bazaj numeraloj kaj formado de ĉiuj numeraloj;
. lertiĝi pri eldirado de adresoj, telefonnumeroj kaj datoj;
. konversacii pri la kalendaro kaj datoj;
. konversacii pri okazaĵoj nunaj, pasintaj kaj estontaj;
. konatiĝi kun ĉirkaŭ 350 vortelementoj kaj alpreni ilin, kiel aktivan vortstokon;

Barboza

# Enhavlisto

***Celo:*** Komenci kaj nelonge vivteni baznivelan komunikadon en plej rutinaj soci-kulturaj situacioj

**Enhavlisto laŭpaĝa:** paĝoj


Esperanto: difino kaj celaro ..... 3, 4
salutoj kaj ĉiutaga frazaro ..... 5 ĝis 7
la alfabeto ..... 8
prononco kaj plejsona sílabo ..... 9, 10
sinprezento al nekonataj homoj ..... 12,14
personaj pronomoj kaj verboj en prezenco ..... 14
identigo de homoj kaj kiel demandi ..... 15
pioniroj de Esperanto ..... 15
identigo de aĵoj ..... 16
montra pronomo **tiu** ..... 17
adjektivoj ..... 19
bazaj numeraloj kaj formado de numeraloj ..... 20
kiel diri adresojn, telefonnumerojn kaj datojn ..... 21
la kalendaro ..... 22
formado de verbaj tempoj kaj modoj ..... 22, 23
prononc-ekzercoj per kantado - kanto:*“Literoj kun ĉapelo“* ..... 9 kaj 24
ekzercaro eksterklasa ..... 25 ĝis 28
vortlisto laŭpaĝa, ĉirkaŭ 350 ..... 29 ĝis 36
utilaj informoj kaj kontaktoj ..... 38

## Esperanto - difino kaj propono

***(tradukenda nacilingven)***

Esperanto estas la plej bona propono pri internacia lingvo.

Tiu aserto praviĝas, ĉar Esperanto estas la sola lingvo havanta la sciencajn ecojn, necesaj por plenumi tiun altvaloran socian rolon, nome: *neŭtraleco, logikeco, reguleco, klareco kaj facileco.*

***neŭtraleco***. Esperanto apartenas al neniu popolo kaj ne portas katenojn de religiaj, politikaj, ekonomiaj aŭ rasaj postuloj. Tiel la Esperanto-uzanto povas komunikigi senĝene en internaciaj rilatoj, evitante subigon al hegemonia lingvo kaj malavantaĝon en komercai kaj diplomatiaj diskutoj.

La ***logikeco kaj reguleco*** de Esperanto estas kvalitoj kiuj multe kontribuas por ĝia sukcesa lernado. La sintezan gramatikan strukturon de Esperanto oni povas lerni tre rapide, kompare kun etnaj lingvoj. La verbaj tempoj kaj modoj de Esperanto estas tute regulaj kaj ĝian vortaron oni konstruas per aldono de afiksoj al internacie konataj radikoj.

La ***klareco*** de Esperanto estas admirinda. Ĝia skribo estas tute fonetika (Oni skribas laŭ la aŭdita fonemo kaj prononcas laŭ la skribo, senescepte.) Tio ebligas al komencanto prononci ĝuste ajnan nekonatan esperantan vorton, sen timo erari. Ankaŭ en la semantika kampo Esperanto estas tre klara, pro ĝia logika kaj regula strukturo.

***kompara facileco***. El tiuj ecoj de Esperanto devenas ĝia rapida kaj facila lernado, kompare kun etnaj lingvoj.

La ***propono*** de Esperanto povas esti tiel sintezata: servi kiel pontolingvo en la komunikado inter homoj de malsamaj lingvoj. Ĉiu homo parolu sian idiomon kaj uzu Esperanton por la rilato kun alilingvano.

**Hejma tasko** - Plenumu la hejman taskon de la sekva paĝo kaj diskutu viajn respondojn kun viaj klaskolegoj en la sekva renkonto.

## Hejma tasko pri la enkonduka leciono

***(tradukenda nacilingven)***

Lernanto ..........................................................................................................

Respondu laŭ via kompreno de la teksto kaj laŭ via penso pri la temo.

1 Kio estas Esperanto kaj kiu estas ĝia precipa propono?

..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................

2 Kial la ***neŭtraleco*** de Esperanto donas al ĝi avantaĝojn por meriti sian elekton por la rolo de internacia lingvo?

..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................

3 Kiuj kvalitoj ebligas al Esperanto esti la plej facile lernebla lingvo?

..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................

4 Libere diru vian impreson pri Esperanto aŭ pri iu alia aspekto de la temo lingvo internacia.

..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................
..........................................................................................................

## Salutoj

**Aŭskultu** *kaj lernu saluti en Esperanto.*


1




**1** *La suno leviĝas.*




**2** *Ili* salutas tage.




**3** *Simpla* saluto.




**4** Ili *adiaŭas*.




**5** Ili *renkontiĝas* nokte.





**6** Ili adiaŭas nokte.

NV ***Esploru la novajn vortojn***
*kun via instruisto ĉe paĝo 29.*

*Ripetu la salutojn post via instruisto.*

http://lernejajklasoj.info/servoj.php

1




7 *Ŝi demandas pri lia sano.*




**8** Li *respondas* pri *sia* sano.




**9** Li *respondas* pri sia sano.




**10** Li prezentas amikinon.




**11** Ili respondas al prezento.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 29.


**Parola ekzercado**

**a** Ripetu la *frazojn* post via instruisto.
**b** ***Stariĝu.*** *Ludu per* salutoj kun *kolegoj*.

## Enklasa frazaro

**Aŭskultu** kaj lernu la frazojn.

2













NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 30.

**Parola ekzercado**

**a** **Ripetu** la frazojn post via instruisto.

**b** **Stariĝu. Ludu** per frazoj kun kolegoj.

## Literumu vian nomon. *la alfabeto*

3 **1 Aŭskultu kaj lernu** la *alfabeton* de Esperanto.

| | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H | Ĥ | I | J | Ĵ |
| K | L | M | N | O | P | R | S | Ŝ | T | U | Ŭ | V | Z |

**2 Ripetu** la alfabeton, post via instruisto.




4 **3 Kantu por lerni**. *(Vidu paĝon 9.)*

a b c ĉ d e f — *Jen* la alfabeto de
g ĝ h ĥ i j ĵ — Esperanto por la mondo.
k l m n o p r — Mi *recitas* alfabeton
s ŝ t u ŭ v z — Kaj mi literumas nomon.

5 **4 Aŭskultu** la dialogon.

**A** Kiu estas via *nomo?*
B Ĉulso Toki.
**A** Kompleze literumu vian *familian* nomon.
B T· O· K· I.
**A** Kompleze literumu vian *personan* nomon.
B Ĉ·U·L·S·O.
**A** Dankon.
B Ne dankinde.




6 **5 Aŭskultu** la dialogon. Poste ***skribu*** la personan kaj la familian nomon de la homo.

.....................................................

7 **6 Prononc-ekzercaro** - Aŭskultu kaj ripetu:

**literoj:** ŝaŝeŝiŝoŝu, ĉaĉeĉiĉoĉu, cacecicocu, ĵaĵeĵiĵoĵu,
jajejijoju, ĝaĝeĝiĝoĝu, gagegigogu, ŭaŭeŭiŭoŭu

**7 Ekzerciĝu** kun via instruisto per la prononco de la nomoj en la *kadro* suba.

8 **8 Aŭskultu** la dialogon:

**A** Vian nomon, bonvolu.
B Linda Darlis.
**A** Darling? Ĉu D·A·R·L·I·N·G?
B Ne. Ĝi estas Darlis.
**A** Ĉu D·A·R·L·I·S?
B Jes. Ĝuste.

| persona nomo | familia nomo | *misa* literumado |
|---|---|---|
| Linda | Darlis | Ĉu D·A·R·L·I·N·G? |
| Valmor | Franca | Ĉu V·R·A·N·S·A? |
| Nanhu | Li | Ĉu L·E·E? |
| Norma | Keli | Ĉu G·E·L·Y? |

**9 Paroligilo** - **Elektu** por vi personan kaj familian nomon el la kadro kaj ludu dialogon kun ***malproksima*** kolego.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 30.

## Prononco *plej sona silabo*

9 **Aŭskultu** *silente ĉiun* linion. Poste **ripetu** ĝin kun via instruisto.

1 Ĉiu vokalo (a,e,i,o,u) formas unu silabon. Unu *vokalo* = unu *silabon*.

instruisto (ins-tru-is-to) [1. 2. 3. 4.]; sekretariino (se-kre-ta-ri-i-no) [1. 2. 3. 4. 5. 6.]; ies (i-es) [1. 2.]; jes (jes) [1.]; tio (ti-o) [1. 2.]

2. La *plej sona* silabo estas la *antaŭlasta*.

psiko**lo**go, **in**ko, **pi**ro, pa**pe**ro, si**njo**ro, strate**gi**o. Ĵozia**ni**ne, Ĵozi**a**ne, Ĵo**zi**as, **Ĵo**zi.

3. ***Distingu*** kaj prononcu *klare* la literojn **u** kaj **ŭ**. (**ŭ** ne estas vokalo, sed *konsonanto*.)

Paŭlo, (Pa**ŭ**-lo) [1. 2.], praulo, (pra-**u**-lo) [1. 2. 3.] Neŭza, (**Neŭ**-za [1. 2.], neuza, (ne-**u**-za) [1. 2. 3.]

4. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **j** kaj **ĵ** ( **j** ne estas vokalo, sed konsonanto.)

krajono (kra-**jo**-no) [1. 2. 3.], ĵurnalo (ĵur-**na**-lo) [1. 2. 3.], jupo (**ju**-po) [1. 2.], ĵurasio (ĵu-ra-**si**-o ) [1. 2. 3. 4.]

5. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **r** kaj **h**.

Romo, homo; rara, haro; rimo, himno; reto, herbo; rito, hidro.

6. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **c** (tso) kaj **k**.

pa**co**, peko; Ti**cor**, tuko; ekonomiko, pa**cien**co; paren**ceco**, skribi.

**Enklasa ekzerco**: **Iru** al la skrib-*tabulo* kun kolego.
**Ludu** dialogojn *similajn* al tiuj:

**A** Kiu litero estas tiu? (S)
B Mi *kredas* ke ĝi estas litero C. Ĉu mi *pravas*?
**A** Ne, vi ne pravas. Ĝi estas litero S.

**A** Ĉu tiu estas litero Ĝ?
B Ne. Ĝi ne estas. Ĝi estas litero Ĵ.

**Kantu por lerni.**

## Alfabeto de Esperanto

4




**Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 30.

## Prononc-ekzercado

10 **Aŭskultu kaj ripetu** la frazojn post via instruisto. *(Ne gravas nun la signifo de la vortoj. Gravas klara kaj bela prononco.)*

Lernu prononcon per trafaj frazoj.
Kamparanoj kantas kune sub la luna lumo.
Ĉu juna Ĉiĉi maĉas ĉion ĉemane?

Ĉu per sapo bufo lavas sin?
Ĉarma Ĉiĉi Ticor loĝas tie.
Ĝilo ĝuis ĉinan ĝinon kun granda ĝojo.

Homoj ŝatas loĝi en helaj hejmoj.
Hundoj jelpas, hojlas, hurlas, bojas.
Mastrino tintis tintilon, servistino venis kure.

Ĉu ajlo kun mielo kombinas?
Rato ronĝis robon ĝis ĉifonigo.
Kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas.

Viro vera ĉiam diras veron.
Ne ŝarĝu vin per ŝarĝo fremda.
Ĉu lano estas ŝafa ŝelo?

> ***Rimarko***: En la alfabeto de Esperanto ne *ekzistas* la literoj Q X Y W. *Tamen* vi devas lerni iliajn nomojn, por literumado: Q kuo, X ikso, Y ipsilono, W *duobla* v aŭ *vavo*.

**Komparado** - *(Ne gravas nun la signifo de la vortoj. Gravas klara kaj bela prononco.)*

11 celo, ĉelo; selo, ŝelo; peco, peĉo; pesi, pezi;
ame, ami; ĝene, ĝeni; ago, agu; gusta, ĝusta;
juro, ĵuro; oro, horo; roko, hoko; ajlo, hajlo;

ia, ja; ie, je; iu, ju; fojno, feino; prujno, ruino;
Kanado, knabo; kavita, kvita; kovanto, kvanto;
alto, aŭto; felto, feŭdo; tial, adiaŭ; iam, ian; iom, ion;

avo, havo, ravo; ero, eĥo; kolero, ĥolero;
sako, ŝako; serĉo, ŝerco; severa, sfera;
eskalo, skalo; eskarpo, skarpo; establi, stablo;

gaso, gazo; raso, razo; dia, ĝia; diri, ĝiri;
tia, ĉia; tie, ĉie; tio, ĉio; tiu, ĉiu; sia, ĉia; ŝia, ĉia.




**Utilaj frazetoj** - Aŭskultu kaj ripetu post via instruisto.

12 Permeson! Mi ĝojas! *Sidiĝu!* Stariĝu!
Ludu kune. Atentu! Ripetu post mi.
Skribu sur la tabulo. Lernu kantante. Ĝis!

Legu al via *apuda* kolego la *sekvajn* frazojn per *onomatopeoj*:

Ĉif-ĉaf, ĉif-ĉaf, ĉif-ĉaf... ŝi *marŝis* sur la *marĉo*.
Tik-tak, tik-tak, tik-tak... tiktakis la *horloĝo* en la nokta *silento*.

**Ekzerciĝu** hejme per la helpo de
via *sontrakaro* aŭ kun via instruisto enklase.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 30.

**Plej** sona silabo


13 **Aŭskultu kaj ripetu** post via instruisto.

in**ti**ma fami**li**a dia**lo**go,
a**min**da **hej**ma e**to**so,
zoolo**gi**a u**ni**ka feno**me**no,
sa**ni**ga bon**gus**ta nu**tra**ĵo,
**pu**raj a**e**ro kaj **a**kvo,
suno**var**mo vi**vi**gas ar**ba**ron,

**plu**vo ple**ni**gas ri**ve**ron,
harmo**ni**a **ho**ma kunvi**va**do,
ho**ma**ra e**ti**ko,
plezur**do**na la**bo**ro,
solida**re**co, res**pe**kto, ami**ke**co.

**Diktaĵo**. *Enigmo* per la alfabeto

**Aŭskultu** la diktaĵon kaj **ligu la literojn** por *aperigi* belan *desegnaĵon*.




NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 31.

14 **Frazetoj** - **Aŭskultu kaj ripetu** post via instruisto.
Kiu kantas tiel bele? Ĉu tio estas libro? Ĉi tio estas libro.
Kiel vi fartas, amiko? Literumu Petro: P·E·T·R·O.

**Paroligilo** - **Iru** kun kolego al la skrib-tabulo.
**Diktu kaj skribu** la literumadon de tri vortoj.

*diverseco protektindas*

## Ekloĝo en nova urbo

***sin prezenti al nekonatoj***

Evelina Ticor *trovas* bonan *apartamenton* por *lui*.


**1 Esploru** la bildojn. Kio *okazas?* ***Fermu*** la libron kaj **aŭskultu** la *konversaciojn*.

15 **2** Ĉu vi *intuicie* komprenis la *socian okazaĵon? Provu resumi nacillingve,* kion vi *aŭdis*.

**3 Aŭskultu *refoje***, *dum* vi *sekvas* silente la skribajn *tekstojn*.

**A** - *surstrate*

**Evelina** *Permesu* min. Ĉu vi estas *Sinjorino* Padila?
Virino *Ne*. Mi ne estas.
**Evelina** *Pardonu* min.
Virino Ne gravas.



**B** - surstrate

**Evelina** Permesu min. Ĉu vi estas Sinjorino Padila?
S-ino Padila *Jes*. Mi estas.
**Evelina** Mi estas Evelina Ticor. Mi telefonis al vi pri la apartamento.
S-ino Padila Mi ĝojas konatiĝi kun vi, *fraŭlino* Ticor.



**C** - en *senmebla* apartamento

S-ino Padila Mi *kontrolu*... Evelina... Ĉu E· V· E· L· I· N· A ?
**Evelina** *Jes, ĝuste*.
S-ino Padila Bonvole literumu vian familian nomon.
**Evelina** T· I· C· O· R.
S-ino Padila Bonvole subskribu *la kontrakton*.



15

**Ĉ -** *sur koridoro de apartamentaro*

**Margareta** Saluton, Sinjorino Padila.
*S-ino Padila* Oh! Saluton, Margo. Kiel vi fartas?
**Margareta** Bone. Kiel **vi** fartas?
*S-ino Padila* Tre bone. Dankon.
**Margareta** (*al Evelina*): Saluton. Ĉu vi estas mia nova *najbarino*?
Evelina Jes, mi estas. Mia nomo estas Evelina Ticor.
**Margareta** Mi estas Margo Lopes. Mi *loĝas supre*, en apartamento 3B.
Evelina Mi ĝojas konatiĝi kun vi, Margo.
**Margareta** Ankaŭ mi ĝojas, Evelina.




NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 31.

## 4 Parola ekzercaro

a **Ripetu** la frazojn post via instruisto, *grupe*.
b **Ludu** la dialogojn kun kolego.
**c** ***Aktorado*** - Stariĝu. **Ludu** *triope* la dialogon antaŭ la klaso, kiel *lertaj aktoroj*.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 32 por *fari* la *suban* ekzercaron.

## 5 Komprena ekzercaro

a **Skribu** *ĝuste aŭ malĝuste* pri la teksto.

1 Evelina konatiĝis kun Sinjorino Padila. ( *ĝuste* )
2 La familia nomo de Evelina estas Ĉisor. ( )
3 Margareta estas lernantino de Evelina. ( )
4 Padila, Soŭza kaj Ticor estas familiaj nomoj. ( )
5 Evelina, Margareta kaj Petro estas personaj nomoj. ( )

b **Kiel *diri? Rilatigu*** la du *kolumnojn*.

| | | |
|---|---|---|
| 1 Ĉu vi estas Sinjorino Padila? | ( ) | S· I· L· V· A. |
| 2 Bonvole literumu vian familian nomon. | ( ) | Mi loĝas supre. |
| 3 Kiel vi fartas? | ( 1 ) | Ne, mi ne estas. |
| 4 Ĉu E· V· E· L· I. N· A ? | ( ) | Jes, ĝuste. |
| 5 *Kie* vi loĝas? | ( ) | Tre bone, dankon. |

c ***Elektu*** frazon **a** aŭ **b** por respondi ĝuste.

1 Ĉu B· R· U· G· G· E· R ?
**a**. Jes, ĝuste.
**b**. Jes. Mi estas.

2 Mi ĝojas konatiĝi kun vi.
**a**. Mia nomo estas # Marcja Padila.
**b**. Ankaŭ mi ĝojas.


3 Mia nomo estas # Petro Kovalski.
**a**. Mi ĝojas konatiĝi kun vi, Sinjoro Kovalski.
**b**. Jes, ĝuste.

Mi ĝojas konatiĝi kun vi. *sin prezenti al nekonatoj*

## 1 Lernu prezenti vin.

a. **Aŭskultu** la dialogojn.





16

**Margareta** Saluton. Mi estas Margareta Lopes.
Cukuru Saluton, Margareta. Mi estas Harada Cukuru, via nova kolego.
**Margareta** Mi ĝojas konatiĝi kun vi, Cukuru.

**Renato** Saluton. Mia nomo estas Renato Roko.
Ĉiĉi Mi estas Ĉiĉi Fitanis.
**Renato** Mi ĝojas *ekkoni* vin, Fraŭlino Fitanis.
Ĉiĉi Ankaŭ mi ĝojas, Sinjoro Roko.

b. **Ripetu** la dialogojn post via instruisto.

c. Ludu la dialogojn. **Stariĝu kaj prezentu vin** al du gekolegoj. ***Uzu*** viajn personajn *informojn*.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 34.

### 2 *Gramatika Guto*

**a.** ***personaj pronomoj***

***Atentu la gestadon*** de via instruisto kaj ripetu.

*singularo*
**Mi** estas la instruisto.
**Vi** estas Gita.
**Ŝi** estas Sandra.
**Li** estas Boris.
**Ĝi** estas *pordo*.

*pluralo*
**Ni** estas vi, ŝi, li, mi kaj ĝi
**Vi** estas Gita, Sandra kaj Boris.
**Ili** estas Petro, Sandra kaj pordo.

Nedifina: **Oni** parolas Esperanton.

**b. La *posedajn* pronomojn** oni *formas per aldono* de la litero **a**:

mi - **mia** vi - **via** ŝi - **ŝia**

**3 Aŭskultu** la sinprezenton de Margo.

17

**Mi** estas Margo Lopes.
**Mia** kompleta nomo estas Margareta Stuart Lopes.
**Mi** loĝas en apartamento 3 B de *konstruaĵo* 3 de Strato Zamenhof.
**Mi** estas najbarino de Evelina Ticor. **Ŝi** loĝas en apartamento 2 B.
**Ŝia** apartamento estas *malsupre* de la **mia**. **Ni** estas bonaj amikinoj.
**Mia** patro kaj mia patrino loĝas *proksime* al **mi**.
**Ilia** apartamento *situas* en Strato Edmond Privat, *numero 9*



**4 Ripetu** la sinprezenton de Margo, post via instruisto.

**5 Prezentu vin**, kiel faris Margo Lopes.

**6 *Hejma tasko*.** Vidu paĝon 25.

## *Kiuj* estas tiuj pioniroj?

*Ki... , Ĉu... demandoj*

La homoj en la *fotoj* ludis *gravajn rolojn* en la *historio* de Esperanto. Via instruisto klarigos pri ili.

**Kompletigu** la dialogojn de la *pioniroj*.


Zamenhof

Grabovski: Permesu min, ĉu ...... ........... *Doktoro* Zamenhof?
Zamenhof: Jes. ......... ......................... .


Klara Zilbernik

Grabovski: Permesu min, ...... ..... ........... Rozalja Zamenhof?
Klara: Ne. ........ ............................ Klara Zilbernik.


Grabovski

Klara: ................ min. ........ ...... ............. Antono Grabovski?
Grabovski: Jes, ....... ...................... . Kiu vi estas?
Klara: Mi estas Klara Zilbernik. Mi ĝojas konatiĝi kun vi.
Grabovski: Ankaŭ ........ ............., Sinjorino ......................... .


Cai Juanpei

Grabovski: .................. min, ....... ........ .......... Edmond Privat?
Cai Juanpei: Ne. ........ .................. Cai Juanpei. Kiu estas ........... nomo?
Grabovski: ........... ................. estas Antono Grabovski. Mi ĝojas konatiĝi kun *orientlanda pioniro.*

**Paroligilo 1 - Identigu** viajn *klaskolegojn*. **Demandu** al via apuda kolego pri ĉiuj *ceteraj* kolegoj, *tiel*:

Kiu estas li? Kiu estas ŝi? Kiuj estas ili?
**Respondu**: Li estas Valter. Ŝi estas Lisbeta, Ili estas Valter kaj Lisbeta. Mi ne *scias*, kiu li estas.

### Gramatika guto

Estas du manieroj demandi en Esperanto:

**1.** per ***Ĉu?*** (Respondu: ***Jes***. aŭ ***Ne***. )

— Ĉu vi komprenis? — ***Jes***. Mi komprenis.
— Ĉu vi komprenis? — ***Ne***. Mi ne komprenis.

**2**. per ***Ki ...*** (Respondu per **informoj**.)

— Ki***el*** vi fartas? — Mi **fartas bone.**
— Ki***u*** vi estas? — Mi **estas Tieko.**
— Ki***e*** estas Ŝiko? — Li **estas en la *salono.***
— Ki***a*** estas Ŝiko? — Li **estas alta, forta...**
— Ki***o*** estas tio? — Tio **estas libro.**
— Ki***...*** ? — ***...*** (**informo**) .

**Paroligilo 2** - Identigu viajn klaskolegojn.

Via instruisto donos al vi *papereton* kun la nomoj de klaskolegoj. ***Moviĝu*** en la *klasĉambro*, identigu ilin kaj **prezentu vin**.

Lernanto A Permesu min, ĉu vi estas Valter Ivanoviĉ?
Lernanto B Ne, mi ne estas.
Lernanto A Pardonu min.
Lernanto B Ne gravas.

Lernanto A Permesu min, ĉu vi estas Valter Ivanoviĉ?
Lernanto C Jes, mi estas.
Lernanto A Saluton. Mi estas Igor Valevski.
Lernanto C Mi ĝojas konatiĝi kun vi, Igor.
Lernanto A Ankaŭ mi ĝojas.


NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 33.

## ***Kio*** estas tio? Kio estas ***ĉi*** tio?

**1** **Rigardu** la objektojn. Ĉu vi povas *diveni* iliajn nomojn en Esperanto?

**2** Ludu duope. Provu kun apuda kolego en 1 minuto *diveni* la nomojn.

18 **3** **Aŭskultu** silente la nomojn de la objektoj.




**3** ***Diktaĵo*** **- Ripetu** post via instruisto kaj **skribu** la nomojn apud la bildoj.

**Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto, ĉe paĝo 35.

**4** *Pliaj* objektoj en la klasĉambro. **Diru** la nomojn, post via instruisto: *skribseĝo, sako, dorsosako, mansako, ŝultrosako, taliosako, skatolo, kajero, bildo, lampo, planko, plafono, muro, mono, monujo, rubujo, averto-tabulo, ventolilo, poŝkomputilo.*

**5** **Ripetu** la demandojn kaj la respondojn, post via instruisto.

| | |
|---|---|
| Ĉu ĝi estas mono? → | Ne, ĝi ne estas mono. Ĝi estas *mano*. |
| Ĉu ĝi estas *viŝgumo* aŭ *kajero*? | Ĝi estas kajero. |
| Ĝi estas skribilo, ĉu? | Ne, ĝi ne estas kreto. Ĝi estas *viŝilo*. |
| Ĝi estas *krajono*, ĉu? | Jes, ĝi estas krajono. |
| Ĉu ĝi estas pordo aŭ *fenestro*? | Ĝi estas ***nek*** pordo ***nek*** fenestro. Ĝi estas skribilo. |
| Kio estas *ĉi tio?* | Kio estas tio? |

**6** **Paroligilo**. Stariĝu. *Tuŝu* kaj *montru* al kolego objektojn en la ĉambro kaj **diru** frazojn, kiel supre.

## Nova en nia strato, ĉu?

*sin prezenti al nekonatoj*

Darjo Primo, la *posedanto* de Kafejo Primo, konatiĝas kun *sia* nova najbarino, Evelina Ticor.

1 **Esploru** la bildojn. Kio okazas? **Fermu la libron** kaj aŭskultu la konversaciojn.

2 Ĉu vi intuicie komprenis la socian okazaĵon? **Provu resumi** nacilingve, kion vi aŭdis.

3 **Aŭskultu refoje** dum vi sekvas silente la skriban tekston.




19

**Darjo** Saluton.
*Evelina* Saluton.
**Darjo** Nova en nia strato, ĉu?
*Evelina* Jes, mi estas nova en tiu ĉi strato.
**Darjo** Ni estas najbaroj, *do*. Mia nomo estas Darjo Primo, kaj **tiu** estas mia *kafejo*.
*Evelina* Mi estas Evelina Ticor. Mi ĝojas konatiĝi kun vi.
**Darjo** Ankaŭ mi ĝojas, Fraŭlino... nnnn... Ĉisor?
*Evelina* Ne. ***Ticor***. *Sed* simple nomu min Evelina.
**Darjo** Bone do, Evelina. Vi simple nomu min...
*Antonja* ***Daaarjo!***
**Zeĉjo** Ah ... Permesu min... Ah... Sinjoro Primo, Sinjorino Primo *deziras*...
*Antonja* ***Daaarjooo!***
**Darjo** ***Momenton, Antonja!***
Dankon, Zeĉjo.
Bone. Mi ĝojis ekkoni vin, Evelina.
*Venu* por la kafo *morgaŭ*.
*Evelina* Dankon, Darjo. Mi *certe* venos.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 33.

**Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 34.

**4 Parola ekzercado**

a. **Ripetu** la frazojn post via instruisto, grupe.
b. **Ludu** la dialogon triope.

**5 Aktorado - Stariĝu.** Rol-ludu triope la dialogon antaŭ la klaso. **Rigardu** rekte al via partnero.

***Memoru***: *Bicikli*, *naĝi* kaj lingvon oni lernas per la *tuta korpo*.

**6 Komprena ekzercaro**

**Skribu** *ĝuste* aŭ *malĝuste* pri la teksto.

1 Fraŭlino Ticor estas nova en tiu strato. ( *ĝuste* )
2 Evelina estas najbarino de Darjo kaj Antonja Primo. (  )
3 La persona nomo de Sinjorino Primo estas Antonja. (  )
4 Antonja Primo tre bone *akceptis* Evelinan, kiel nova najbarino. (  )
5 Zeĉjo kaj Antonja *interrompis* la konversacion de Evelina kaj Darjo. (  )




**7 Kiel diri**

Ludu la suban dialogon kun apuda kolego per gestado kaj *mienesprimoj*.

— Vi simple nomu min Zeĉjo.
— Dankon!
— Ne dankinde.
— Ĝis revido! Bonan sanon!

**8 Aŭd-kompreno**

20

**Rigardu** la *viron*, kiu telefonas.
**Aŭskultu** la dialogon.
**Aŭskultu** refoje kaj skribu la familian nomon de la viro.

( ....................................... )

**Kia** ĝi estas? *adjektivoj*

**Gramatikaj gutoj**

**a-vortoj** - *Adjektivojn* oni indikas en Esperanto per la gramatika *finaĵo* **a**.

***pluralo*** - La pluralon oni indikas per la gramatika finaĵo **j**.

**a-vortoj** (adjektivoj) *akompanas* la **o-vortojn** *(substantivojn)* al *pluralo*:

Ticor estas famili**a** nom**o**. Margo estas person**a** nom**o**.
Evelina, Margareta, Petro kaj Lucja estas person**aj** nom**oj**.

*Ĝirafo* kaj *elefanto* estas *grand**aj** best**oj**.* *Formikoj* kaj *abeloj* estas *best**oj** malgrand**aj**.*

Renata kaj Rozalja estas bel**aj** kaj inteligent***aj*** *knabin**oj***.

NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 36.

## Ekzercaro

**1 Ŝanĝu** al pluralo.
mia amiko ......................................................................
via biciklo ......................................................................
ŝia krajono ......................................................................


**2 Aŭlkultu** la *legadon* de la tekstoj kaj **skribu** la nomojn de la bestoj sur la liniitaj *spacoj*.
*foko, serpento, strigo, ĝirafo, kanguruo.*

**A**. *Ĝi* estas nokta *birdo*. *Ĝia* koloro estas *bruna* aŭ *griza*. Ĝi vivas en la tuta mondo. Ĝi *manĝas* malgrandajn bestojn. Ĝi faras *strangajn* sonojn: kuru' kuru' kuru'. Ĝia nomo estas .......................

**B**. Ĝi estas *longa* kaj *maldika*. Ĝi ne havas *piedojn*. Ĝi manĝas malgrandajn bestojn. Ĝi estas *danĝera*. Ĝia nomo estas ....................................................

**C**. Ĝi *povas kuri* tre *rapide*. Ĝi havas *longajn kolon* kaj *krurojn*. Ĝi manĝas *foliojn* de arboj. Ĝi estas tre, tre *alta*. Ĝia nomo estas ...............................

**Ĉ**. Ĝi povas bone naĝi en la *maro*, sed malbone marŝi sur la tero. Ĝi estas *inteligenta* kaj lernas *ĵongladon* por *amuzi* la *publikon*. Ĝi manĝas *fiŝojn*. Ĝi vivas en la *nordaj maroj*. ***Ĝia*** nomo estas ................



**D**. Ĝi estas tre *forta* kaj *saltas* per la ***mal**antaŭaj* kruroj. Ĝi portas la *bebojn* en *speciala sako* ĉe la *ventro*. Ĝi vivas en Aŭstralio kaj Novzelando. Ĝia nomo estas ..................................................

**Demandoj pri bestoj**: Ĉu ĝi estas granda? malgranda? danĝera? alta? malalta? dika? longa? Kie ĝi vivas? en akvo? sur tero? Ĉu ĝi naĝas? marŝas? flugas? Kiu koloro? Ĉu griza, bruna, flava? Ĉu ĝi manĝas herbon, *viandon* aŭ bestetojn? Ĉu ĝi havas voston? longan kolon?

**3 Paroligilo** - Per la supraj demandoj kaj *per muldbestoj* ni ludos nun tre interesan ludon.

**Hejma tasko** - Vidu paĝojn 27, 28.

## La bazaj *numeraloj*

21

**1 Aŭskultu** la legadon de la *bazaj numeraloj*.

| 0 | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *nul* | *unu* | *du* | *tri* | *kvar* | *kvin* | *ses* | *sep* | *ok* | *naŭ* | *dek* |

**2 Ripetu** ilin post via instruisto.

**Ekzerciĝu**, dirante al la instruisto la *numerojn* de la *pasportoj* kaj *kredit-karto*.




NV **Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 35.

**3 Paroligiloj** - Prononcu kun via instruisto la nomojn en la kadro suba.

| | |
|---|---|
| Nakagawa, Kazuo, | 3345-6532 |
| Akimoto, Saburo, | 3556-3928 |
| Ŝibata, Masao, | 3555-3465 |
| Ŝibajama, Mikio, | 3625-6758 |
| Taniguĉi, Ŝigenori, | 3593-5073 |
| Macumoto,Toru, | 3545-7563 |

3 a. **Aŭskultu kaj ludu** la dialogon, por uzi ĝin kiel *modelon*.

**A** Rrriiimmm, rrriiimmm.....
**B** *Telehelpo*.
**A** *Kompleze* informu al mi la numeron de Kazuo Nakagawa.
**B** Ĉu vi bonvolus literumi la familian nomon?
**A** Nakagawa: N·A·K·A·G·A·W·A.
**B** La numero estas 3345-6532.
**A** Mi notas. Ĉu 3345-6532?
**B** Ĝuste.
**A** Dankon.
**B** Je via dispono.

3 b. **Ludu la rolojn**:

**Lernanto A** Vi *bezonas* telefoni al persono el la listo supra, sed vi ne havas la numeron. **Petu** helpon de Telehelpo.
**Lernanto B** **Ludu** la rolon de Telehelpo. **Uzu** la informojn el la telefon-listo supra.

22

**4 Aŭdkompreno.**

Paŭlo *notas mendojn* pri pico.

**Aŭskultu** dufoje la dialogon kaj **skribu** la telefonnumerojn de la *kliento*.

.................................................




**5 Paroligiloj**

5 a. **Ludu** la dialogon suban, kun apuda kolego.

**A** Kiu estas via nomo?
**B** Ĝi estas Luiza Marilaki.
**A** Kiu estas la numero de via poŝtelefono?
**B** Ĝi estas 34681024.
**A** ..........................................................................
**B** ..........................................................................
**A** ..........................................................................

5 b. **Moviĝu en la klasĉambro.** Petu la telefonnumerojn de du klaskolegoj, ***konfirmu*** ilin kaj skribu ĉi-sube.

*nomo:* ............................ *telefonnumero:* ..........................

*nomo:* ............................ *telefonnumero:* ..........................

## Numeraloj ĝis mil

23

**1 Aŭskultu** la legadon de la numeraloj.

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 11 dek unu | 12 dek du | 13 dek tri | 14 dek kvar | 15 dek kvin | 16 dek ses | 17 dek sep | 18 dek ok | 19 dek naŭ | 20 dudek |
| 21 dudek unu | 22 dudek du | 23 dudek tri | 30 tridek | 31 tridek unu | 40 kvardek | 50 kvindek | 60 sesdek | 70 sepdek | 80 okdek |
| 90 naŭdek | 99 naŭdek naŭ | 100 cent | 200 ducent | 300 tricent | 909 naŭcent naŭ | 1000 mil | 1999 mil naŭcent naŭdek naŭ | | |

**2 Ripetu ilin:** dek unu, dek du, dek tri ...

**Esploru** la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 35

### Formado de la numeraloj

Dekojn oni formas per kunigo de **dek** al la bazaj numeraloj. dek, dudek, tridek, ...
Centojn oni formas per kunigo de **cent** al la bazaj numeraloj. cent, ducent, tricent, ...
Milojn oni formas per ***aldono*** de **mil** al la bazaj numeraloj. mil, du mil, tri mil, ...
Ordajn numerojn oni formas per aldono de la adjektiva **finaĵo a**. unu**a**, du**a**, ducent**a**, mil**a**..

24

**3 Aŭdkompreno**. Kiun numeralon vi aŭdas? **Aŭskultu** kaj poste **skribu** la aŭditan numeralon.

1. .............. 2. .............. 3. ............... 4. ............... 5. ............... 6. .................

**Rimarko 1** *Adresojn* oni ne *tradukas* al Esperanto, sed oni skribas en nacia lingvo.

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenveg 176,
NL-3015 BJ Rotterdarn
Nederland

Brazila Esperanto-Ligo,
SDS, Ed. Venancio III, Sala 309
70084-970 - Brasília
Brasil

Hungaria Esperanto-Asocio
Bródy Sándor u, 38
HU-1088 Budapest
Magyar

**Rimarko 2** Por legi *poŝtan kodon* kaj telefon-numerojn oni *devas* diri *ciferon* post cifero,
tiel: 32345678, legu: tri du tri kvar kvin ses sep ok.

### 4 Paroligilo

**Ludu duope.** Per la subaj demandoj ***malkovru*** la adresojn kaj telefon-numerojn de via apuda kolego. **Notu** ilin en via adreslibro.

Ĉu vi loĝas *proksime*?
Kiu estas via kompleta adreso?
Ĉu vi *memoras* la poŝtan kodon de via adreso?
Diru vian *retpoŝtan* adreson, bonvolu.
Kiu estas via telefon-numero?

***Raportu*** pri via *partnero* al la tuta klaso.

